Christian Morgenstern,

# Juna knabino en la montoj

*tradukita de Willy Nüesch*

Nebuloj valen pendas tie ĉi ...
»Ne scias mi pri mia est' kaj dev' ...
Mi plenas de pulsanta, juna viv' ...
Ho vivo, venu, via estu mi.

Ho vivo, viv', ne sola restu mi!
Por ĉiu ŝarĝo pretas mia kor':
Ho, sorton donu al mi en ĉi hor'!«
Nebuloj valen pendas tie ĉi ...

*Traduko de la Germana poemo "Junges Mädchen in den Bergen" de* Christian Morgenstern *(Kristiano Matenstelo, ∗1871-05-06 – †1914-03-31) en Esperanton de* Willy Nüesch *(Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, ∗1927-05-09).*

*Arg-144-288 (2013-08-28 18:46:05)*

*La tradukinto Willy Nüesch (Etzelstr. 6, CH-8634 Hombrechtikon, Svislando, telefono: +41-(0)31-302 66 56) donis al mi, Manfred Retzlaff, la permeson publikigi siajn poem-tradukojn en la interreta poem-kolekto "Argiope.bl0rg.net". Li ankaŭ kontrolis tiun chi elpresaĵon kaj mi korektis tajperarojn laŭ liaj indikoj. Tiu ĉi lia traduko aperis en la literatura revuo "Fonto" n-ro 274 en Oktobro 2003.*